

Esperanta Grupo pri Universitato (kaj Strategio? = EGUS)

Rezultoj de la ena demandareto

Klarigo: L = ĉi tiu grupo de kunlaborantoj

1. Kiel vi priskribus L-on, se iu demandus al vi pri kio ĝi celas kaj laboras?

Ni	grupo		progresigi	E-on en la Universitato	Esperantaj kursoj
Estas	subgrupo	, kiu celas	pligrandigi	per	interlingvistikaj agadoj
	fakularo		revigligi		E-movado universitata
	komisiono		promocii		E-komunumo
					universitata
					instruado, lernado,
					informoj
					esplorado

2. Laŭ viaj preferoj, ĉu vi aldonus, forĵetus, modifus ion rilate al grupa celaro?

Ĉefe ne. Du membroj aldonas ion. Sinteteze: (1) Viko dezirus labori sur la vojo atingi, ke Esperanto estu la lingvo de la internacieco universitata. Kaj (2) Radojica rimarkas tri vojojn: (a) subteni la estantecon, (b) trovi la priskribon pri la dezirata estonteco, kaj (c) organizi la informon pri la nuntempaj agadoj.

3. Kaj rilate al grupa maniero labori?

Ĝenerale, la membroj ŝatas la nuntempan manieron, sed proponas plibonigi ĝin per:

1. Pligrandigi la nombron de membroj, kaj aranĝi grupetojn laŭ la taskoj.
2. Ĉefe labori rete sen obligi renkontiĝojn, kiuj havu la rolon diskuteti la laborajn rezultojn.
3. Atingi la statuson de formala grupo aŭ almenaŭ kompreni la komunan movadan intereson.

4. Kiu estas via rolo ene de L?

Ne eblas resumi la malsamajn respondojn. Legu ilin se vi havas intereson. Tia rezulto klarigas, ke ni komencis labori sen bone scii pri tio, kion ni celas.

5. Kion L bezonas por sukcese atingi siajn celojn?

Pli-malpli estas konsento pri la taŭgeco pligrandigi la apogon pri tri flankoj: pli da laborantoj, pli da subteno (mona, rimeda...) kaj pli da institucia agnosko. Psike, oni ankaŭ bezonas paciencon, reciprokan subtenon kaj praktikajn rezultojn.

6. Kiujn aliajn estaĵojn vi konas, kiuj iom similas al L?

- AIS
- Antaŭa DESKF iniciatita de Bociort.
- Antaŭa E@I
- CED, kaperitan de ESF
- IKU
- Sekcio el UEA zorgata de Stephan McGill
- Sevila Universitata Grupo
- Universitata komisiono de ILEI
- Universitata Retlisto gvidata de Renato
- Universitato de Esperanto de Denis Keefe

7. Aldonu tion, kion vi dezirus rilate al tiu temo.

Ĉefe ne okazis konkretajn aldonaĵojn, krom de Renato, kiu mencias bezonatan subtenon de ILEI kaj UEA; kaj Elisee, kiu rimarkas la bezonon, ke ĉiu havu konkretan taskon.